



# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA DE VUO



ORGANO DE FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO

NI PERSISTU. — KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO. — 11a KON-  
GRESO DE FL. L. E. — JOĈJO. — LA STUDANTO. — HET  
EXAMENCOMITE. — IGNORADO. — ESPERANTO IN DE  
PRAKTIJK. — DIVERSAJOJ. — INTER NI. — BIBLIOGRAFIO.  
— ANGULO DE LA SERĈEMULOJ. — LA REDAKCIO RES-  
PONDAS.

Orgaan van den  
**VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND**



HOOFDBESTUUR :

Voorzitter : Dr. Th. VAN GINDERTAELEN, Stefaniestraat 44, Antwerpen.  
Ondervoorzitter : G. BAUMERS, Korte Veldstraat 35, Turnhout.  
Secretaris : G. DEBROUWERE, Magdalenestraat 29, Kortrijk (tel. 1654).  
Peningmeester : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Boekhandel (F. E. L.) : E. CORTVRIENDT, P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.  
Examens : Dr. F. ROOSE, Guido Gezellelaan 15, Brugge.  
Tentoonstellingsmateriaal : G. DE BOES, Wijnstraat 81, Ronse.  
Voordrachten : A. ACKAERT, Gerardstraat 162, Brussel 4.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt om de maand. — Redactie : Fr. VAN DOOREN, Langstraat 40, Borgerhout. Kopij uiterlijk op 15<sup>en</sup> van elke maand bij de redactie. — Administratie : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Posttrekking nr. 2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel. — Barema der advertenties op aanvraag bij de administratie.

BIJDRAGEN :

Leden-abonntenen : fr. 25.— 's jaars; gewone bondsleden : fr. 5.— 's jaars.

## Escepta Oferto !



H. Haefker :  
**JARMILOJ  
PASAS**

Mond-  
historio  
originale  
verkita  
en  
Esperanto

500 grandformataj paĝoj kun artaj reproduktaĵoj kaj geografiaj skizoj.

Eble la plej impona verko kiu aperis en la lingvo internacia ! Ĝi estas evidenta pruvo, ke eĉ plej malfacila, spirita tasko perfekte povas esti majstrata per Esperanto. Mondhistorio de profesia, state premiita verkisto. « Jarmiloj Pasas » estas objektiva verko, riĉega je ideoj, fonto neelĉerpebla por la pliriĉiĝo de l'scio. En pli ol cent ĉapitroj preterpasas nian spiritan okulon la potenco Romano de l'Homaro. La eksteraĵo de la libro estas konforma al ĝia enhavo. Presita per klara litero sur senligna, fortika, malpeza papero. La bindo estas tuttola kun ora stampajo.

La prezo de tiu verkego estis ĝis nun fr. 150.—

**escepta prezo : fr. 50.—**

(plus fr. 2.50 por sendkostoĵ; al membroj de Fl. L. E. ni sendas afrankite)

Mendu ĉe :

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

# FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Langstraat 40  
Borgerhout ANTWERPEN

ADMINISTRACIO : Vlaamsche Stw. 70  
BRUSSEL. P. Ĉ. K. : 2321.50 de Fl. L. E.

La redakcio rezervas al si la rajton rifuzi, korekti, mallongigi aŭ iel ajn ŝanĝi la ensenditajn kontribuajojn.

Jara kotiz-abono 25 fr.

APERAS MONATE

## NI PERSISTU

Servu ni al la afero,  
La plej bela sur la tero.

A. DOMBROWSKI

Kiam Galileo asertis ke la mondo turniĝas, oni konsideris lin herezulon kaj devigis lin publike malkonfesi sian teorion. Hodiaŭ oni instruas en ĉiu lernejo tiun saman teorion.

Kiam en la mezepokoj iu kuraĝis propagandi la liberigon de la sklavoj kaj servutuloj oni lin pendigis kiel danĝerulon al la unue trovebla arbo. Nuntempe oni malliberigus ĉiun kiu ankoraŭ provus iun sklavigi.

Kiam Stefenson malkaŝis sian planon konstrui lokomotivon oni nomis lin fantaziulon kaj gravmienaj profesoroj kun kompato klarige al li, ke neniam lia ideo estos efektivebla. La vaporo ne havus sufiĉan energion por funkciigi la maŝinon, la radoj glitus sur la feraj reloj, jes oni eĉ antaŭvidis ke la bovinoj en la paŝtejoj ektimus kaj ne plu donus lakton. Nuntempe estas fervojoj en ĉiuj landoj, en ĉiuj mondpartoj.

Kiam oni unuafoje proponis fari terajn ŝipojn, la fakuloj eksplodis per laŭta ridego kaj diris ke tiaj konstruaĵoj tuj alfundiĝus. Hodiaŭ oni ne plu konstruas lignajn ŝipojn.

Kiam Markoni unue klarigis la funkciadon de radioaparato kaj skizis la eblecojn de sia eltrovaĵo, ĉiuj universitatoj instruis al la studentoj, ke efektive estas interesa, teoria eksperimento sed ke la radio neniam estos praktike uzebla. Hodiaŭ la radio konkeris la mondon.

Kiam oni komencis paroli pri flugmaŝinoj ĉiuj kompetentuloj opiniis la pionirojn stultuloj kaj klarigis ke eĉ infano devus kompreni ke io pli peza ol aero neniam povos flugi. Hodiaŭ la aeroplanoj mastras la ĉielon.

Kiam la unuaj propagandistoj paroladis pri demokrateco, ĝenerala voĉdonrajto kaj la okhora labortago, la konservativuloj ĝemplendis pri sovaĝigo de la moroj, venonta anarĥio kaj pereado de la tuta civilizacio. Hodiaŭ ĉiuj tiuj ideoj jam delonge efektiviĝis.





**ESTRARKUNVENO** okazis en Antverpeno, dimanĉon la 17-an de marto. La estraro decidis okazigi ĝeneralan ligkunvenon en Bruselo dum aprilo, la prez. raportis pri la starigita ekzamena komisiono, okazis ide-interŝanĝo pri nia 11-a kongreso en Bruselo kaj estis pridiskutata labor-programo por nia Ligo.

**GENERALA LIGKUNVENO** okazos en Bruselo, dimanĉon la 14-an de aprilo, en « Vlaamsch Huis, Grootte Markt 16, je la 10-a antaŭtag-meze.

- Tagordo :**
1. Alparolo de la prezidanto;
  2. Raporto pri la antaŭa ligkunveno;
  3. Nia 11-a kongreso en Bruselo;
  4. Ekzamena komisiono;
  5. Ĝenerala propagando;
  6. Diversaĵoj.

Ni insiste petas niajn sekciojn sin reprezentigi en tiu ĝenerala kunveno kaj esperas je la interesiĝo de reprezentantoj kaj membroj.

**GENERALA JARRAPORTO FL. L. E.** Verŝajne kaŭze de la nunaj cirkonstancoj la prizorgantoj de niaj servoj kaj multaj sekcioj nur malfrue ensendis raportojn al la ĝenerala sekretario. Sekve al tio nia ĝenerala jarraporto ne pretiĝis sufiĉe frue por publikigo en jena numero de F. E. De tiu raporto, kiu nun estas presota, niaj sekcioj baldaŭ ricevos ekz. Tiu raporto poste aperos en la venonta numero de nia organo.

**FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO** eldonis ampleksan kaj klarigan librokatalogon-prezaron kiu estas senpage sendota al ĉiu petanto.

Multaj abonantoj je Romanserio 1940, kiuj alpagis por la premio « La nekonata konato », alskribis nian libro-servon petante klarigojn pri nericevo de tiu premio, despli ĉar la unua volumo de la romanserio jam delonge estas en ilia posedo. La abonantoj eksciis ke teknikaj malhelpoj ĝis nun malebligis la dissendon de la premilibro; ili tamen trankviliĝu : la dissendo okazos plej baldaŭ eble! Meze de aprilo aperos la dua volumo « Judoj sen Mono ».

**11-a KONGRESO DE FL. L. E.** La organiza komitato de nia 11-a kongreso, kiu okazos en Bruselo la 12-an kaj 13-an de majo (Pentekosto), konsistas el G. Broodcoorens, prez., E. Cortvriendt, sekr., kaj A. De Keyzer, kas.

(Daŭrigo de p. 49.)

Kiam la unuaj kuraĝuloj eklaboris por donaci al la mondo siajn eltrovaĵojn kaj boniarojn kiaj la aŭtomobilo, la skribmaŝino, la presarto, la moderna hirurhio, la Ruĝa Kruco, la kinematografio, la stenografio, k.t.p., k.t.p., ili unue rikoltis nur sarkasmon, mokadon kaj malhelpon, sed ili persistis... kaj venkis.

Hodiaŭ la mondo ne ankoraŭ volas nian Esperanton. Se ni persistas ankaŭ Esperanto morgaŭ venkos.

Fr. Van Dooren.

## 11-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista

Bruselo, Pentekosto 1940.

Ĉu kongresi aŭ ne kongresi? Tio estis la demando kiu okupis la menson de multaj el ni. Se antaŭ kelkaj monatoj povis regi dubo pri tiu dilemo nun ununura respondo eblas : Ni kongresos !

Efektive, kiam eksplodis la nova freneza hombuĉado, terurigitaj ni starigis al ni la demandon : ĉu la armeoj de l'malpacantaj landoj denove kolizios en flandra teritorio? Sep monatoj post la militeksplodo tio ne okazis, kaj plej verŝajne kaj espereble tio ne okazos en la estonteco. Krome ni rigardu ĉirkaŭe. En Nederlando la diversaj Esperanto-ligoj febre laboris por siaj respektivaj kongresoj, kiuj nun jam estas okazintaj kaj sukcesis! Eĉ en militantaj landoj nia movado nur parte lamas, tie Esperanto-periodaĵoj pluaperas kaj, laŭ la ebleco, la poresperanta laboro estas daŭrigata. Konsiderante, ke al la Esperanto-organizaĵoj de la neŭtralaj landoj apartenas la honora tasko alteni la verdan standardon ĝis paco denove ekregos, la ne-okazigo de niaj kongreso kaj jarkunveno tutsimple estas neimagebla!

Por la dua fojo sekcio Bruselo akceptis la honoran taskon organizi la ĉiujaran ĉeikunvenon de nia landa organizo. Efektive, en 1935 okazis en Bruselo unu el la plej brilaj kongresoj de F.L.L.E. El ĉiuj niaj kongresoj nia 6-a en Bruselo arigis la plej grandan nombron da partoprenantoj. Krome ĝi estis la plej internacia el ĉiuj niaj kongresoj ĉar 8 naciecoj estis reprezentataj. Eksterlandanoj ĝin ja partoprenis 161-ope!

Kio iĝos nia 11-a kongreso? Tio dependas de ni mem, t. e. de la flandraj Esperantistoj. Sen ia dubo nia venonta kongreso okazos en cirkonstancoj kiuj neniam antaŭe sin prezentis. Tion konscias la organiza komitato kiu laŭ tiuj cirkonstancoj intencas singarde labori. Pro adapto al la nuna situacio nia 11-a estos pli intima, sed espereble ankaŭ pli fruktedona ol iu el niaj antaŭaj kongresoj, kiuj — ni malkaŝe konfesu — ofte estis tro pompaj laŭ eksteraĵo kaj tro sensignifaj laŭ enhavo. La pli malpli deviga foresto de diversaj solenaj sed temporabaj program-punktoj, disponigos al ni sufiĉan tempon por, en bone organizitaj kunvenoj, kongresi en la vera senco de la vorto, t. e. pritrakti la punktojn de komuna intereso de la flandra Esperantistaro. Tamen ni ne antaŭtempe aŭguru pri la enhavo de nia 11-a kies programo aperos en la venonta numero.

Ni tamen jam malkaŝu ke kunlaboros i. a. la teatra rondo de sekcio Turnhout kies aktiveco sur tiu tereno estas admirinda kaj la Brusela Esperantista Kanthoro kiun aplaŭdi multaj el ni jam havis okazon. Preparu vin por nia 11-a kaj faru la unuan paŝon : pagu senprokraste la malgrandan kotizon !

Interkonsile kun la estraro de F.L.L.E. la organiza komitato, kies prezidanto estas s-ano Broodcoorens, fiksas la kongreskotizon je la reduktita prezo de 5 fr., pagota al poŝtkonto 2526.28 je nomo de kongresa kasisto A. De Keyzer, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Korespondaĵojn oni sendu al la kongresa sekretario E. Cortvriendt, P. van Humbeekstraat 3, Brussel. Loĝadon la organiza komitato laŭpete prizorgos.

La organiza komitato.



## JOĈJO

(Daŭrigo kaj fino.)

« Ĉio estis silenta. Mi tamen aŭdis kraketon, mi bruligis alumeton... kaj ĉe la muro mi vidis Merjan kun tiu viro. La okuloj de Merja estis dekoble pli grandaj ol kutime kaj ŝiaj haroj estis malligaj. Pro miro, mi lasis la alumeton fali en la fojnon, kaj Nia Dio permesis ke ĉio ekbrulu. En mia furiozo mi ne sciis kion mi faris. Mi impetis al ili kaj kune kun Merja kaj la viro ni falis triope tra la fojnejo sur la kaprinojn. Mi ne doloris min, kaj ne precize konsciante kion mi faras mi fuĝis for tra riveretojn kaj hegojn. Miaj vestoj estis disŝiritaj kaj miaj manoj sangaj, mia vizaĝo ardis pro la urtikoj. La tutan nokton mi kuradis, malsaĝa, freneza, kvazaŭ persekutata de demono. Horojn malproksima mi ankoraŭ vidis la ilamojn kaj pensis pri Merja. De fore, inter la bovinoj kiuj jam delonge kuŝis en la paŝtejoj, mi hurlis kaj kriis larmoplena : « Adiaŭ Merja... bela, bela Merja ».

Kaj alitone, profunde sopirinte, li daŭrigis kun klopŝo en la gorĝo :

— « Mi ne havas familion, sinjoro, mi estas trovito... kaj Merja estis la homo kiu unua diris al mi vere dolĉan vorton. En kelkaj minutoj mi vidis antaŭ miaj okuloj tiun belan revon murdita. »

« Mian tutan havaĵon mi tenis en mia poŝo. Pri kiu mi devis ankoraŭ zorgi? Reiri mi certe kuraĝis... sed ĉu Merja ne estis morta, eble forbrulinta?... Kaj eĉ se ŝi ankoraŭ vivis, ĉu ŝi ankoraŭ povis esti io al mi, nun kiam tiu viro ŝtelis ŝin? La karceron mi ne tiel timis, ĉio estis finita por mi. Merja kun siaj blondaj haroj estis for, perdita. Kaj krome, mi ne plu rezonis, mia situacio estis senelira, sinjoro, kaj mi rekuris pli foren, ĉiam antaŭen. Por mi, tiu punkto estis vere gehena. »

« Mi enfuĝis Francujon kaj post longa serĉado mi alvenis en karb-minon. Estis ja plej bone por mi. Enrampi la teron, kurbis min por kviete plori, kaj mi ploris! Jarojn mi ploradis kaj vagadis ĉien, rabia pri mi mem, nenie trovante ripozon. Neniam virino povis resti ĉe mi pli ol horon ne angorante. Kaj kiam foje mi estis ĉe virino, mi estis rabia ĝismorde. Mi pensis pri ĉio, frenezige. Kaj kiam mi havis virinon ĉe mi, tiam mi pensis pri Merja kaj en mia rabio mi sovaĝe kaptis ŝin kaj kriis : « Merja!... ». Alifoje, mi opiniis min mem tiu viro, tiu fremda kiu pasis antaŭ la fenestro, la ŝtelanto de mia Merja... kaj mi batis min mem... La virino kredis ke mi frenezigiĝis, kriis helpon kaj pro angoro kuris for... Mi evitis la virinojn. Kaj neniam ankoraŭ mi amis virinon. Nur ŝi, Merja, restis al mi, nur ŝia bildo. Sola mi konsolis min nokte en mia mansardo. Senkonscie mi estis tirinta de ŝia kolo la pompaduran ŝalon, kaj, estis verŝajne stulte, sed tiu ŝalo kuŝis kun mi en la lito... kaj ĝi estis adoraĵo por mi. Ekde tiam mi neis Dion. Jaroj, jaroj kaj tiom da jaroj rampis antaŭen kaj nur kelkaj aferoj pri tiu malgaja historio restis klaraj en mia memoro. La resto eluziĝis. Mi estis satplorinta. Nur la kisojn de Merja mi ankoraŭ sentis, kaj mi vidis ŝiajn okulojn, larĝe apertajn, kaj ŝiajn malligajn blondajn harojn, kaj mi posedis la ŝalon, sed ankaŭ la ŝalo eluziĝis, pro la kisoj. Estas stulte, kiam mi memoras tion... Neniam dum tiu longa tempo mi aŭdis ion pri tiu historio, kaj ĉar mi tute ne sciis legi... Kaj paroli pri tio, kiel estus utilinta? »

« Sed, du jarojn antaŭ la milito, mi foje sidis en kabareto en Lens kaj de la bufedo viro alrigardis min. Li prenis sian glason, sidigis sin ĉe

mi kaj, iom rigardinte, li diris : « Tagon, Joĉjo ». Ne eblis nei. Li rakontis ke la domo de Merja estis cindrigita ĝistere, ke la vizaĝo kaj la manoj de Merja estis tiel brulvunditaj ke ŝi ne plus estis rekonebla. Oni trovis la viron kun rompita kruro kaj Ameli mortis proksimume kvar semajnojn poste pro kongesto. Mi estis kondamnita kiel krimbrulinganto je dek jaroj... Kaj Merja tiam foriris de la parofo kaj neniu sciis kien. »

« Dudek sep jaroj pasis, ĉio estis forgesita, diris la viro. Pro tiu bato, tro forta, mi falis kiel ŝtono sur la plankon. Kvin semajnojn poste mi forlasis la hospitalon. En mian koron estis veninta la deziro revidi Merjan, Merjan kiu estis tiel bela, Merjan kun ŝia blonda hararo; mi sentis ke mi devas peti ŝian pardonon, kaj mi revenis en la parofojn. Mi posedis ĉirkaŭ okcent frankojn, kaj esperante trovi Merjan, mi foriris iun matenon de Lens ĝis mia regiono. Neniu rekonis min kaj mi rekonis nenion. La vilaĝeto estis iĝinta granda parofo. Mi iris esplori tie kie, tridek jarojn antaŭe, la plej belaj kaj unikaj horoj de mia vivo entombiĝis. Staris tie nova domo, trinkejo. « Nia Hejmo » estis majuskle skribite sur ĝi. Jes, nia hejmo, ĉu ĝi ne devus esti tia? Nenion mi retrovis kio povis retrovigi Merjan, ĉio estis elviŝita. Tiam, kaŝnome konata, mi laboris en la kampoj kaj mia kromnomo estis : « Joĉjo, la Mordanto ». Se ili sciis kion mi devis tramordi! La milito eksplodis kaj alportis al mi ankoraŭ multe da ĉagreno, da mizero, kaj, pelita de la Germano dum li pafe pecigis la mondon, mi eniĝis en la Virejo kaj tie vi trovis min... Merja, bela Merja... »

Estis la lastaj vortoj de lia historio.

Kun streĉita atento mi aŭskultis ĝis la fino. Li silentis nun, kaj, la manojn antaŭ la okuloj, li dolĉe ploris. Kompatinda homo!

Subite li saltleviĝis kiel vekita el terura sonĝo.

— « Kion mi do rakontis, sinjoro, ĉu mi rakontis ke... mi... ne, ĉu? »

— « Estu kvietaj, Joĉjo. »

Kun sovaĝa vizaĝo li petegis al mi nenion diri, ne perfidi lin, ne nomi lian nomon.

— « Ne, Joĉjo, ne, nenion vorton mi diros, nun iru hejmen kaj estu kvietaj. »

Sanceliĝante Joĉjo levis sin, kaj refalis sur sian seĝon. Mi iris serĉi glaseton da brando kaj ĝi donis al li iom da forto. Helpata de mi, li stumblis de la ŝtuparo, kaj ĉe la antaŭpordo, li etendis manon.

Li estis for, liberita, sed same malfeliĉa, kaj sur min pezo estis ŝarĝita, ŝnuretoj estis ligitaj ĉirkaŭ min, kiuj igis min preskaŭdire senpova. Kian vivon vivis tiu simplulo! Nur la senlima amo al tiu virino tenis lin rekta, al virino kiu ĉiam restis mistero por Joĉjo. Li ĝuis la plej puran amon en la brakoj de tiu virino, kaj ŝi « Merja kun la blonda hararo », detruis tiun vivon en unu momenteto, igis ĝin ruĝa kalvario. Tridekkvin jarojn li adoris tiun sanktulinojn, ŝian ŝalon li eluzis kise, la ŝalon kiun ŝi svingis ĉirkaŭ lian kolon por premi la lastan fajran kison sur liajn lipojn, la ŝalon kiun ŝi portis, kelkajn sekundojn poste, ĉe la viro kiu ŝtelis lian Merjan. Por Joĉjo tio restis sanga mistero. Kaj kiam, en besta ĝuo, li provis, forgesi sian senliman suferon, tiam en la imago la bela Merja anstataŭis la fiinon...

\*\*\*

La postan tagon mi vane atendis Joĉjon. Maltrankvila mi iris je la dekunua al la azilo. La maljuna monaĥino apertis.



— « Ha! estas vi, sinjoro! Estas certe por Joĉjo. »

— « Jes, fratino. »

— « Eniru, sinjoro, eniru, Joĉjo fartas tre malbone, li febras. »

Kio? Joĉjo febris! Ĉu eble mia scivolemo kaŭzis la malsanon de Joĉjo? La fratino tiam rakontis ke hieraŭ Joĉjo alvenis hejmen « tiel brava », io ja ne tre kutima, ke la tutan tagon li estis tiel afabla, sed ke pasintnokte li songis la tutan klostron (5) vekita, ke li vokis kaj hurlis ke la klostro flamas kaj ke « Merja » mortis kaj tiel plu. Oni devis tenadi lin, kaj nun li kuŝas en la ĉambreto flanke de la manĝejo, febra. Li ankaŭ petis pri mi.

Rapide mi sekvis la monahinon. Ŝi kondukis min laŭ larĝa ŝtuparo sur interetaĝon kie, supre de pordo pentrita griza, pendis granda krucifikso.

— « Ni metis lin en la ĉambreton, ĉar eble li ankoraŭ deliros. »

Mi eniris kaj sidigis min flanke de Joĉjo. Li ripozis trankvile., kaj liaj okuloj naĝis en larmoj. Lia rideto ĝentilege bonvensalutis min, kaj de sub la kruda tola kovrilo li ŝovis sian manon renkonte al mia.

— « Tagon, kara Joĉjo », mi flustris.

Kapskueto tiam diris al mi kion li ne povis plu vortigi.

— « Ĉu vi ne fartas bone, Joĉje? »

La fratino restis stari apud la lito, kaj per siaj bonaj okuloj rigardis al Joĉjo kaj poste al mi.

— « Joĉjo, vi petis pri mi, ĉu vi devas diri ion? »

Joĉjo duone kapjesis kaj tiam strabis al la monahino. Mi komprenis kaj ankaŭ la fratino. Ŝi iris ĝis Joĉjo, ordonis lin resti kvietaj, indikis al mi la ŝnureton ĉe la pordo « Jen la sonorilo, sinjoro » kaj eliris sur siaj molaj pantofletoj. Kiam ŝi malaperis, Joĉjo premis mian manon.

— « Sinjoro, ĉu vi diris ion? »

— « Ne, Joĉjo, ne, eĉ ne unu vorton, kaj mi bedaŭras ke eble mi kaŭzis vian malsanon. »

Li rektigis sin kaj mi vidis ke li devas diri ion. Mi apogis lian dorson per mia mano kaj petis ke li rekuŝigu.

— « Ne, ne, sinjoro, ĉu vi scias... Merja estas tie, al ŝi mi parolis pasintsemajne... »

— « Merja, ĉu Merja estas tie? » mi demandis, mirante.

— « Mallaŭte, sinjoro, mallaŭte », li ektimis. « Jes, ŝi estas tie, mi vidis ŝin en la ĝardeno, ŝi sarkis kaj mi rekonis ŝin!... »

Joĉjo, kiu duone rektigis sin, refalis sur sian kapkusenon kaj du larmoj ruliĝis sur lia febra vizaĝo.

— « Jes, ŝi estas tie... kaj mi tiel deziris ankoraŭ foje vidi ŝin. Ŝi sarkis, mi iris flanke de ŝi, ne sciante ke estas ŝi, mi rigardis ŝin kaj ŝi rekonis min kaj diris : « Joĉjo ». Mi diris : « Merja » kaj tiam alkuris la monahino kiu enirigis Merjan kaj promesis punon al mi. Kaj nun estas finite por mi, mi mortas, tiu bato estos la lasta kaj la plej torta... Kial do ŝi revenis tien, se estis nur por ke tiu monahino punu nin! »

« Sinjoro, nur unu minuton mi vidis ŝin kaj ŝi min, sed en ŝiaj okuloj mi legis ke ŝi bedaŭras. Mian tutan vivon mi revidis en tiu minuto,

(5) Klostro : uzata tie en la sencó pli ampleksa de la monahinejo, de la maljunulejo mem.

kaj mi kontentas... mi revidis ŝin, nun estas finite... Sed ke mi ankoraŭ foje revidu ŝin... »

Mi atendis tion kaj tuj decidis : la lasta deziro de Joĉjo estos plenumita. Mi vokis la monahinon kaj ekster la ĉambro mi petis paroli kun la ĉefpatrino. Per mallongaj vortoj mi eksplikis al ŝi la okazaĵon kaj pene akiris ke Merja povos veni mallonge ĉe Joĉjo.

Mi reeniris la ĉambron. Joĉjo fiksitis sur min siajn okulojn demandantaj. Jes, mi kapskuis. Li rektigis sin. Ankoraŭ unufoje li sentis sin firma. Li revidos kaj adiaŭos la belan Merjan.

— « Sinjoro, kion mi diros al ŝi! Mi ne kapablos paroli. »

— « Mi faros anstataŭ vi, Joĉjo; kuŝu nur kaj restu kvietaj. »

— « Sinjoro, sub mia kapkuseneno kuŝas paketo, mi venigis vin por doni ĝin. »

Mi serĉis sur la kapkusenon de Joĉjo, kaj en peco da papero mi malkovris la kise eluzitan ŝalon, kaj, en ĝi, tolan monujeton kun kelkaj frankoj.

— « Vi ĝin donu al Merja, mi ne kapablos paroli plu. »

Oni singarde frapis sur la pordon. Joĉjo ektimis kaj komencis febre tremeti. Mi malfermis kaj staris antaŭ la ĉefpatrino kaj maljuna ineto kun difektita vizaĝo.

— « Sinjoro, ŝi diris frostete, nur kvin minutojn, mi fidas al vi. »

Mi enirigis kaj kondukis Merjan sur la seĝon flanke de Joĉjo. Ambaŭ ili ploris kaj ne povis eligi vorton. Mi metis ŝian manon en tiun de Joĉjo, kaj ambaŭ ili tremis, kaj nur de tiam kuraĝis rigardi sin.

Tra siaj rememoroj Joĉjo vidis la belan Merjan de antaŭe, kaj ŝi sentis sin tiel kulpa ke Joĉjo ŝajnis al ŝi la martiro de ŝia kulpo. Post momenteto Joĉjo flustris tiel dolĉe, tiel veplene : « Merja! » kaj estis kvazaŭ li alrigardus Sanktan Marion. Same mallaŭte ŝi reflustris : « Ho, Joĉjo! »

— « Pardonon, Merja, diris Joĉjo, kun la febre radiantaj rigardoj turnitaj al ŝi, kaj Merja glitis de sia seĝo sur la genuojn flanke de Joĉjo kaj lasis sian kapon fali sur la manon de Joĉjo.

Oni frapis, mi iris vidi, la kvin minutoj pasis. Mi prenis la maljunulineton ĉe brako.

— « Estas tempo », mi flustris emociita.

— « Tagon, Joĉjo. »

— « Tagon, Merjan. »

La postan tagon Joĉjo mortis la morton de la satigitoj. Liaj lastaj vortoj estis : « Adiaŭ, Merja, bela, bela Merja ».

R. Boudry.

**Noto de la redakcio** : Ni juĝis necese ellasi al la novelo du-tri esprimojn kiuj, niaopinie, povus ŝoki iujn el niaj legantoj. Pro tiu ellaso ni petas la pardonon de aŭtoro kaj tradukintoj!

**LITERATURA MONDO**, la grava Esperanto-eldonejo, informas sian tutmondan klientaron, ke ĝi transmetis sian agadcentron de vendado al Rotterdam. La adreso en Budapeŝt de L. M. ne plu validas. Mendojn kaj pagojn oni direktu ekskluzive al sekva adreso : Literatura Mondo — A. C. van Ingen — Rotterdam-W., Schiedamseweg 209b, Nederlando. (Informcele ni aldonas ke Flandra Esperanto-Instituto vendas ĉiujn eldonaĵojn de L. M.)



## I.

### Divido de la vortoj.

En la flandra, kiam nia plumo alvenas ĉe la rando de la paĝo, ni ne hezitas, kaj tranĉas vorton ne tute skribitan laŭ ĝiaj silaboj (be-kam-pen, mi-li-ta-ris-me) aŭ, se ĝi estas kunmetita, laŭ ĝiaj konsistigaj partoj (aard-appel, land-bouwer). Ĉu ni faros same en Esperanto?

Oni povas teorie koncepti tri eblojn :

1. Dividi tute libere, tute kaprice : m-enso, me-nso.
2. Transporti konsidere al la gramatikaj eroj : Esper-ant-o, hom-ec-o.
3. Apliki, kiel en la flandra, la silabigon : for-ĝis-to, ti-me-ma.

Estas notinde ke nenie troviĝas fiksa regulo kaj ke Zamenhof skribis en Lingvaj Respondoj ke oni devas ĝeni sin per nenio en la dividado de la vortoj kaj ke oni povas elekti la manieron plej oportunan en donita kazo.

Tamen, por favori la unuecon en ĉi rilato kaj eviti anarhian situacion, ĉu ne estas konsilinde agi laŭ la maniero 3? Tiu sinteno ŝajnas pravigebla per la praktiko de Zamenhof kiu mem nomas tiun metodon la plej ordinara, kaj krome per la logiko : kial do ĉiu gramatika parto de vorto prezentas, en nia lingvo, apartan signifon ?

Se escepte necesus tranĉi alimaniere vorton, ekzemple pro la longeco de ĝia radiko, tiam oni prefere dividi laŭ la silaboj : arbitre erigi vorton montriĝas evidente malpli facile akceptebla (Es-peranto).

Konklude : dividi la vortojn laŭ iliaj gramatikaj eroj.

## II.

### A) Por komencantoj : Esperantigu.

1. Het is wenschelijk, de zinnen aandachtig te lezen, alvorens ze te vertalen. Ook is het raadzaam, zoo te schrijven, dat uw taak goed te lezen is.
2. De toren van ons dorp is niet meer dan 40 meter hoog. Is de toren van uw dorp hooger?
3. Het grootste huis van deze drie wordt bewoond door den oud-burgemeester van onze stad. Hij woont daar al drie jaar.
4. In de herfst rijpen de vruchten en maakt de wind de boomen kaal.
5. Nadat hij enkele minuten gewacht had, vervolgde hij zijn verhaal.
6. Wat is het hier koud! Wie is de oudste van u beiden?
7. Hoeveel moeite hij zich ook gaf, hij slaagde niet, zijn doel te bereiken.
8. De (om)gevallen boom versperde de weg, zoodat we onze wandeling niet konden voortzetten.

#### Korekto.

a) **Drie muizen** : Een bijgeloovige prins zag eens in een droom drie muizen : een vette, een magere en een blinde. De prins ontbood een voorzegger, die den droom op de volgende wijze verklaarde : « De vette muis is uw minister, de magere is uw volk, en de blinde is uw portret, mijn prins. » (El « Cours pratique d'Esperanto », p. 153)

b) **Vijf of zeven** : Een zekere boer had in de stad zes ezels gekocht en leidde ze naar huis. Onderweg zette hij zich op een hunner en de vijf overige liepen vóór hem. Al rijdende telde hij : « Eén, twee, drie, vier, vijf... wat is dat ? Ik kocht toch zes ezels en waarom zie ik er maar vijf? »

Hij telde opnieuw de voor (hem) loopende ezels en precies de zesde was verloren geraakt. Al rijdende dacht hij op den slechten dief. Bij zijn huis hield hij stil. De echtgenoot luisterde naar het gebeurde, daarna zei zij : « Bedaar, mijn wijze echtgenoot, gij ziet slechts vijf ezels, doch ik zie er zeven. » (El « Examen doen », p. 29)

### B) Por progresantoj : Korekto.

Paĉjo Musset (E. Claes).

Nun mi rakontos al vi kiel paĉjo Musset el Cernay-en-Dormois finis sian vivon en la militkaptitejo de Erfurt.

Li estis sesdekkvinjara, kaj kondukita tien kun sia nepeto de dek unu jaroj, kun la maljuna Collot kaj kun multaj aliaj de sia vilaĝo. Ili ne sciis kial, sed kiam ili estis tie la Germanoj nomis ilin « Francs-Tireurs ».

Paĉjon Musset oni ĉiutage povis vidi, ĉiutage iom pli maljunan kaj malgrasan, ĉiutage iom pli kurban kaj mizeran, vagadanta inter la barakoj, kaj tenanta per mano sian nepon, Jules Musset, « son petit gas ». Liaj malriĉaj vestoj ĉifone pendis sur lia konsumita korpo, malpuraj kaj ŝiritaj, lia ĉapo estis profunde tiritita sur lian frunton, liaj ŝuoj sube estis tute eluzitaj, kaj ĉiu matenon, li ŝovis ion da pajlo en ilin por ne tro senti la malsekon. Preskaŭ ĉiutage mi vidis lin tia preterpasi, la okulojn direktitajn al la tero, kun lia kaviginta vizaĝo, iam sencele rigardi antaŭ sin, al nekonata forajo, kaj babili kun « son petit gas », kiun li tenis per mano.

### C) Por ĉiuj : Trovu la sekvajn esprimojn en la nederlanda.

Sen spirhalto. — Ne lacigu vin vane! — Vi estas brava knabo. — La rutinaj ideoj de la amaso. — Fripono plej fripona. — En la tumulto de la batalo. — Nek per petoj, nek per minacoj. — Havu okulojn kaj orelojn, sed ne buŝon! — Li estas la pupilo de via okulo. — Porcio da batoj. — Kunĉeniĝo de la cirkonstancoj. — Kien malaperis la tempo. — Balzama dormo. — Iri senrevene. — En praa stato. — Insulto ne alĝuiĝas.

#### Korekto.

La unua renkontito.	Ne longe marĉandi.
Mia koro estas agordita melankolie.	Krii alarmon.
Koketi kun si.	Egalvalori ion.
Kartaŭgur(ad)i.	Per konsilo kaj helpo.
La kuranta jaro.	Studi la juron.
Onidire... (Laŭ famo...).	Enamiĝi al...

## III.

### RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

**Tyneverum, Antwerpen.** — Koran dankon pro viaj interesaj kontribuajoj; ni uzos ilin en la venonta numero.

**H. V. H., Berchem.** — Se vi volas agrable perfektigi, ripetante la studitajn gramatikajn nociojn kaj samtempe akiri novajn konojn, vi eble povus havigi al vi la verketon de J. Baghy « La Verda Koro ». Ĝi kosta 16 fr. kaj estas havebla ĉe nia Instituto. Via rimarkigo pri « peli » kaj « puŝi » estas prava.



## HET ESPERANTO-EXAMEN COMITE VOOR VLAANDEREN

Het lijdt geen twijfel dat 25 Februari 1940, in onze Esperantogeschiedenis, als een verheugenden en uiterst belangrijken dag zal bestempeld worden en blijven, bijzonder indien men zich de moeite wil getroosten de tijdsomstandigheden even in oogenschouw te nemen, tijdsomstandigheden die gewis onze noeste bedrijvigheid aan banden had moeten leggen en ieder vooruitstrevend initiatief uitsluiten.

Op 25 Februari 1940 dus, de « historische » dag, werd te Antwerpen, in een stoffige en duistere herbergzaal de « **Esperanto-Ekzamena Komitato en Flandrujo** » definitief gesticht : na lange, herhaalde en nauwkeurige besprekingen der ontwerpen van een grondwettelijke overeenkomst en een inwendig reglement vermochten de afgevaardigden van Fl. L. E., F. L. E. en F. U. K. E. (vooralsnog zegde R. B. L. E., hoofdzakelijk wegens technische redenen, haar medewerking niet toe) de officieele stukken te onderteekenen.

Niet lang wenschen we hier uit te weiden over de groote weerklink welke deze oprichting zal vinden in de Esperanto-kringen, doch het weze ons toch toegelaten, in het eng kader van dit artikel, enkele bijzonderheden toe te lichten.

Het Comité stelt zich ten **doel** :

- 1° Een basis van samenwerking tusschen de landelijke bonden vast te leggen;
- 2° Examens te organiseeren op een degelijken en stevigen grondslag;
- 3° De uitslagen van de leergangen op een hooger peil te drijven;
- 4° Een officieele bekrachtiging der uit te reiken diploma's te bekomen.

